

BRIGETIO



La nomo Brigetio /pr. brigeĉio/ estas vaste konata inter la arkeologoj provincaj kaj inter la scienculoj okupiĝantaj pri la antikva historio. Brigetio estis antikva urbo, situanta kie la hodiaŭa Szőny /pr. soenj/ urboparto de Komárom, havanta ĝi abunde altnivelajn trovaĵojn, skulptitajn kaj epigrafitajn ŝtonmemoraĵojn. Krom Carnuntum (hod.: Bad-Deutsch Altenburg – Petronell, Aŭstrio), Vindobona (hod.: Vieno) kaj Aquincum (hod.: Budapeŝt-Óbuda) Brigetio estis la posteno de la Legio I. Adiutrix el inter la 4 legioj postenataj en la provinco Panonio, de la unua jarcento p.k. ĝis la fino de la regado de romianoj.

Post la okupo de Panonia-provinco en la 1-a jarcento p.k., sur la teritorio okupita de la Azulus-gento, Brigetio estis fondata ĉe la bordo de Danubo. Unue estis farata la soldatejo konstruita elligno-tero. Ĉi tion ŝanĝis p.k. je la jarcentŝanĝo 1-2-a, la kazerno de la ĉi tien lokigita Legio I. Adiutrix, ĉirkaŭita tio almenaŭ per 540 x 430m granda duobla kavfosaĵo. Sur la alia bordo de Danubo oni konstruis t.n. kontraŭ-fortreson nomita ĝi Celamantia (hod.: Iza-Leányvár, Slovakio). La devo de fortresoj kaj soldatoj estis observi la Kvadgento-loĝantojn en la barbarujo, kaj defendi la trapasadojn militajn kaj komercajn.

La kanzono de Brigetio havis kontakton kun la aliaj legio-kanzonoj, defendantaj tiuj la limon de Panonio, kaj kun la enprovincaj kolonioj pere la vasta vojreto. Mem la vojo „limes” (hod.: n-ro 1-a ĉeflandvojo) trakondukis la koloniopartojn de Brigetio.

Kiel ĉie en la Romia Imperio, ankaŭ Brigetion ĉirkaŭis kolonio urbeska sen urborango, loĝita tiu kun la manfaristoj kaj metiistoj servantaj la soldatojn, kaj kun la familianoj de soldatoj. Tiu „canabae legionis” proksimume situis sub la orienta parto de la nuna Szőny, nomata tio Molaj. La disvastiĝo de la „canabae” estas sufiĉe precize ĉirkaŭlimigebla. Dum la arkeologaj laboroj el la iama romia kolonioparto estas elfositaj loĝdomoj kun riĉe pentritaj muroj kaj kun plankhejtiloj. En la okcidenta parto de „canabae” verŝajne estis sanktejcentro. Ĉi tie en la fino de deknaŭa jarcento kaj en la 50-aj jaroj de la pasinta jarcento estis elfosataj sanktejoj aludaj pri orientaj dioj, ekz. kultejo de „Jupiter Dolichenus” kaj „Mithras” dioj.

Oriente de la „canabae” troveblas pliaj malfru-romiaj tombejoj. En la ŝtonkolektejo de muzeo Klapka György (Komárom, Fortreso Igmánd) la plej multaj videblaj sarkofagoj estas trovitaj ĉi tie. La plej freŝaj (en 1998 tri sarkofagoj kun riĉaj apartaĵoj, en 1999 de ĉi tiuj pli okcidente trovitaj ŝton- kaj brikoĉerkoj) estas ekspoziciataj en la ĉefejo de muzeo (Komárom, Kelemen László u. 22). Ĉiu tombejo devenas el la 4-a jarcento.



Okcidente de la legio-kanzono situis la amfiteatro, kies restaĵoj estis videblaj sufiĉe bone en la 18-a jarcento laŭ la priskribo de anglaj vojaĝantoj R. Pococke kaj J. Milles. El al priskriboj estas konata akvokondukilo supertera, kiu transportis akvon el la direkto Tata en Brigetion.

De la legio-kanzono okcidente situis 2 km-e la civitana kolonio, kiu en la jaro 214 ricevis municipian kaj poste ne longe la kolonian urborangon. Laŭ la spertoj de arkeologaj laboroj, kiuj okazas daŭre ekde 1992, kaj en la sola neenkonstruita parto - foirplaco, kaj en la enkonstruita parto de civitana urbo, estis ĉi tie loĝdomoj riĉe ornamitaj kun murpentraĵoj, kiuj loĝdomoj situis en la ambaŭ flankoj de la limvojo: norde en unu vico, sude en multaj vicoj. En la foirplaco estas elfosita 3m larĝa strato kovrita ĝi kun grandaj ŝtonplatoj, kiu strato certigis la trapaseblecon inter la domoj. En ties orienta flanko estis loĝdomoj, kaj en la okcidenta flanko estis bakejo kaj verŝajne aliaj vendejoj. La objektoj trovitaj en la foirplaco, kaj la murpentraĵoj estas videblaj ankaŭ en la ĉefejo de muzeo.



Laŭ niaj nunaj konoj en la epoko malfru-romia, la romianoj forlasis la teritorion de „canabae legionis”: la tiel malokupiĝa parto de tiam servis kiel tombejo. Laŭ la elfosadoj, la civitanan urbon ties loĝantoj forlasis en la mezo de 3-a jarcento p.k. La domĉambrojn ili malplenigis zorge kaj la neuzitaj domoj foje ruiniĝis.

La murojn kaj defendilarojn oni rekonstruis ankoraŭfoje en la kadro de la lasta granda Danub-regiona limfortigado, dum la erao cezaro Valentinianus la I-a. Ankaŭ al la nomo de tiu cezaro estas ligita la lasta mencio de nomo Brigetio, en la antikliteraturo latinlingva: Amminaus Marcellinus priskribis en sia historia verkaĵo, ke en la kazerno de Brigetio mortis cezaro Valentinianus la I-a, en 375 p.k.

